

La Samanta-Mukha-Parivarto
aŭ
Evangelio de Avalokiteŝvaro

妙法蓮華經普門品第二十五

trad. Kiuiĉi Nohara, Japanio

Antaŭparolo de la Tradukinto

Samanta-mukha-parivarto estas la nomo de ĉapitro en la fame konata Budhisma sankta skribaĵo, Saddharma-pundarika-sutro¹. La ĉapitro predikas pri virtoj kaj agoj de Bodhisatvo-Mahasatvo Avalokiteŝvaro, kiu estas simbolo de sankta amo, kaj kiu estis kaj estas multe adorata precipe de la nordregionaj Budhanoj. La sama parivarto (ĉapitro) en la ĉinlingva traduko, kiu estas ankaŭ iam eldonita kiel aparta libro, kaj estas konata per la dua titolo “Avalokiteŝvara Sutro²”, estis iam vaste legata de Budhanaj laikoj, kaj pro tio, ĝi multe influis la japanan literaturon en la meza epoko. Efektive troviĝas ĉe ni centoj da rakontoj, kiuj rakontas pri realiĝo de la sankta promeso, donita en la Evangelio de Avalokiteŝvaro.

Ĉi tiu libreto estas tradukaĵo el sanskrita originalo, kiu iomete diferencas de ĉinlingvaj tradukoj. La originala teksto de la dua duonparto de la parivarto (t.e. la versa parto) estas ankaŭ adone enpresita, paralele kun ĉinlingva traduko kaj ĝia japana elparolo. La tradukinto esperas ke la verketo iom intereso ne nur piajn Budhanojn, sed ankaŭ ĉiujn Esperantistojn, kiuj havas iom da rekono pri la japana mezepoka literaturo.

¹ 妙法蓮華經

² 觀音經

La Samanta-Mukha-Parivarto

Tiam Bodhisatvo-Mahasatvo* Akŝajamati ekstaris el la seĝo, kovris sian unu ŝultron per la survesto, metis la dekstran genuringon al tero, direktis la kunmetitajn manojn al la Sinjorego*, kaj diris al la Sinjorego: Pro kia kaŭzo, Sinjorego, estas Bodhisatvo-Mahasatvo Avalokiteŝvaro nomata Avalokiteŝvaro? Tiel demandite, la Sinjorego parolis al Bodhisatvo-Mahasatvo Akŝajamati: - Supozu, filo de bona familio, ke estas ĉi tie centmil-dekmilion-miliardoj da vivantoj, kiuj suferadas doloron; se ili nur aŭdos la nomon de Bodhisatvo-Mahasatvo Avalokiteŝvaro, ĉiuj estos liberigitaj el amaso da doloraĵoj. Tiuj, kiuj tenadas en koro la nomon de Bodhisatvo-Mahasatvo Avalokiteŝvaro, se ili enfalos en fornego, filo de bona familio, estos savataj de tie dank' al la lumo de Bodhisatvo-Mahasatvo Avalokiteŝvaro. En la okazo, filo de bona familio, ke vivantoj estas forprenataj de riverfluo, se ili alvokos al Bodhisatvo-Mahasatvo Avalokiteŝvaro, la rivero donos al ili transvadejon. En la okazo, filo de bona familio, ke multaj centmil-dekmilion-miliardoj da vivantoj ŝipirantaj sur maro por serĉi oron, oraĵon, gemon, perlon, diamanton, lazurŝtonon, multekostan konkon, koralon, smeraldon, blankkoralon, ruĝperlon, kaj ceterajn multekostaĵojn, estas kun ŝipo forblovataj de nigra ventego, alportataj al la bordo de la insulo de rakŝasinoj*, se nur unu el ili alvokos al Bodhisatvo-Mahasatvo Avalokiteŝvaro, ĉiuj estos savataj el la insulo de rakŝasinoj, Pro tiu kaŭzo, filo de bona familio, Bodhisatvo-Mahasatvo Avalokiteŝvaro estas nomata Avalokiteŝvaro.

En la okazo, filo de bona familio, ke iu estas alkondukata al ekzekutejo, se li alvokos al Bodhisatvo-Mahasatvo Avalokiteŝvaro, glavo de la ekzekutisto rompiĝos peceten. Eĉ se, filo de bona familio, la tria potenco de mil mondoj estas plenaj de jakŝoj* kaj rakŝasoj*, okaze ke la nomo de Bodhisatvo-Mahasatvo Avalokiteŝvaro estas elparolata, ili ne povos rigardi homojn kun malafablaj okuloj. En la okazo, filo de bona familio, ke iu vivanto, ĉu kulpa ĉu senkulpa, estos malliberigita per ligna aŭ fera malliberigilo aŭ fera kateno, se li tenados en koro la nomon de Bodhisatvo-Mahasatvo Avalokiteŝvaro, li estos liberigita el la ligna aŭ fera malliberigilo aŭ fera kateno. Tia estas, filo de bona familio, la potenco de Bodhisatvo-Mahasatvo Avalokiteŝvaro.

Kaj, filo de bona familio, supozu ke la tria potenco de mil mondoj estas plenaj de malbonuloj, malamikoj kaj rabistoj, armitaj kun glavoj; karavanestro vojaĝas kondukante grandan karavanon kun multege da multekostaĵoj; dum vojaĝado, la karavananoj ekvidas rabistojn, malbonulojn kaj malamikojn, armitajn kun glavoj, kaj estas terure timigataj, ĉar ili pensas sin tute senhelpaj; kiam la karavanestro parolas al la karavano: Ne timu, filoj de bona familio, ne timu, sed ĉiuj unuvoĉe alvoku al la Bodhisatvo-Mahasatvo Avalokiteŝvaro, kiu estas donanto de sentimeco, kaj vi estos baldaŭ liberigitaj el la danĝero de la rabistoj, el la danĝero de la malamikoj; tiam la tuta karavano unuvoĉe alvokas al Avalokiteŝvaro: Adorkliniĝon, adorkliniĝon al Bodhisatvo-Mahasatvo Avalokiteŝvaro, donanto de sintimeco! Tiam pro rememoro

de la nomo, la karavano estos savata el ĉiuj danĝeroj. Tia estas, filo de bona familio, la potenco de Bodhisatvo-Mahasatvo Avalokiteŝvaro.

Tiuj vivantoj, filo de bona familio, kiuj agadas pro voluptamo, liberiĝos de la voluptamo, dank' al adorkliniĝo al Bodhisatvo-Mahasatvo Avalokiteŝvaro; tiuj vivantoj, kiuj agadas pro koleremo, liberiĝos de la koleremo, dank' al adorkliniĝo al Bodhisatvo-Mahasatvo Avalokiteŝvaro; tiuj vivantoj, kiuj agadas pro malsaĝeco, liberiĝos de la malsaĝeco, dank' al adorkliniĝo al Bodhisatvo-Mahasatvo Avalokiteŝvaro.

Se, filo de bona familio, virino deziranta havi virseksan idon, adorkliniĝe fidos al Bodhisatvo-Mahasatvo Avalokiteŝvaro, naskiĝos al ŝi knabo, bela, gracia, vidinda, havanta la bonan karakterizaĵon de knabo, ĝenerale amota, akironta korfavaron, plantonta la bonan radikon; se ŝi deziros havi knabinon, naskiĝos al ŝi knabino, bela, gracia, vidinda, havanta la plej ĉarman mienon kaj bonan karakterizaĵon de knabino, ĝenerale amota, akironta korfavoron, plantonta la bonan radikon. Tia estas, filo de bona familio, la potenco de Bodhisatvo-Mahasatvo Avalokiteŝvaro.

Kaj, filo de bona familio, kiuj adorkliniĝe fidas al Bodhisatvo-Mahasatvo Avalokiteŝvaro, kaj tenadas lian nomon, al tiuj ne mankas la bona frukto. Supozu, filo de bona familio, ke iu adorkliniĝe fidas al Bodhisatvo-Mahasatvo Avalokiteŝvaro, kaj tenadas lian nomon; kaj la alia adorkliniĝe fidas al aro da Budhoj-Sinjoregoj, egalnombraj al la sableroj de 62-oble pligrandigita rivero Ganga, kaj tenadas iliajn nomojn, kaj al tiom multe da Budhoj-Sinjoregoj, kiuj loĝas, vivtenas kaj travivas, ĉivarojn*, farunbulojn, litaĵojn, kaj medikamenton oferas kiel honorsignon. Nu, filo de bona familio, kiom da merito, ĉu vi pensas, ĉi tiu filo aŭ filino de bona familio amasigas per tio? Tiel demandite, Bodhisatvo-Mahasatvo Akŝajamati respondis al la Sinjorego: Multe, Sinjorego, multe, Sugato*, multe da merito ja amasigas per tio la filo aŭ filino de bona familio. Diris la Sinjorego: La merito, filo de bona familio, kiun oni amasigas, respektante tiom multe da Budhoj-Sinjoregoj, kaj tio, kion oni amasigas, dirante eĉ unuvorte adorkliniĝon al Bodhisatvo-Mahasatvo Avalokiteŝvaro, kaj tenadante lian nomon, estas egalaj - unu nek plimulta nek malplimulta el la alia. Kiam oni respektas la Budhojn-Sinjoregojn, egalnombrajn al la sableroj de 62-oble pligrandigita reivero Ganga, kaj tenadas iliajn nomojn, kaj kiam oni adoras Bodhisatvon-Mahasatvon Avalokiteŝvaron, kaj tenadas lian nomon, ambaŭokaze, amasaĵo de la merito estas ne facile pereigonta en la daŭro de centmil-dekmilion-miliardaj kalpoj. Tiom supermezura estas, filo de bona familio, la merito rezultonta el tenado de la nomo de Bodhisatvo-Mahasatvo Avalokiteŝvaro.

Tiam Bodhisatvo-Mahasatvo Akŝajamati demandis al la Sinjorego: Kiamaniere, Sinjorego, Bodhisatvo-Mahasatvo Avalokiteŝvaro vizitas nian mondon Saho*? Kiamaniere li instruadas la Dharmon* al vivantoj? Kaj kia estas la sfero de taktikaĵo de la Bodhisatvo-Mahasatvo Avalokiteŝvaro? Tiel demandite la Sinjorego responde parolis al Bodhisatvo-Mahasatvo Akŝajamati: estas mondoj, filo de bona familio, kie Bodhisatvo-Mahasatvo Avalokiteŝvaro instruadas la Dharmon al vivantoj, en la formo de Budho*(1); estas mondoj, filo de bona familio, kie Bodhisatvo-Mahasatvo

Avalokiteŝvaro instruadas la Dharmon al vivantoj, en la formo de Bodhisatvo (2); aŭ kie Bodhisatvo-Mahasatvo Avalokiteŝvaro instruadas la Dharmon al vivantoj, en la formo de pratiekabudho*(3); aŭ kie Bodhisatvo-Mahasatvo Avalokiteŝvaro instruadas la Dharmon al vivantoj, en la formo de ŝravako*(4); aŭ kie la Bodhisatvo-Mahasatvo Avalokiteŝvaro instruadas la Dharmon al vivantoj, en la formo de braĥmo*(5); aŭ kie la Bodhisatvo-Mahasatvo Avalokiteŝvaro instruadas la Dharmon al vivantoj, en la formo de ŝakro*(6); aŭ kie la Bodhisatvo-Mahasatvo Avalokiteŝvaro instruadas la Dharmon al vivantoj, en la formo de gandharvo:*(7); al tiuj vivantoj, kiuj estas kondukeblaj per jakŝo*, li instruadas la Dharmon en la formo de jakŝo (8); al tiuj vivantoj, kiuj estas kondukeblaj per iŝvaro*, li instruadas la Dharmon en la formo de iŝvaro (9); al tiuj vivantoj, kiuj estas kondukeblaj per maheŝvaro*, li instruadas la Dharmon en la formo de maheŝvaro (10); al tiuj vivantoj, kiuj estas kondukeblaj per ĉakravartiraĝo*, li instruadas la Dharmon en la formo de ĉakravartiraĝo (11); al tiuj vivantoj, kiuj estas kondukeblaj per piŝaĉo*, li instruadas la Dharmon en la formo de piŝaĉo (12); al tiuj vivantoj, kiuj estas kondukeblaj per veŝravano*, li instruadas la Dharmon en la formo de veŝravano (13); al tiuj vivantoj, kiuj estas kondukeblaj per senapatio*, li instruadas la Dharmon en la formo de senapatio (14); al tiuj vivantoj, kiuj estas kondukeblaj per braĥmano*, li instruadas la Dharmon en la formo de braĥmano (15); al tiuj vivantoj, kiuj estas kondukeblaj per vaĝrapanio*, li instruadas la Dharmon en la formo de vaĝrapanio (16). - Tian neimageblan virton, filo de bona familio, havas Bodhisatvo-Mahasatvo Avalokiteŝvaro. Bodhisatvo-Mahasatvo Avalokiteŝvaro, filo de bona familio, donadas sentimecon al la vivantoj, kiuj estas en timo; pro tio li estas nomata Sentimodonanto* ĉi tie en la mondo Saho.³

Tiam Bodhisatvo-Mahasatvo Akŝajamati diris al la Sinjorego: Sinjorego, ĉu ni donu al Bodhisatvo-Mahasatvo Avalokiteŝvaro sanktan donacon, sanktan veston? La Sinjorego respondis: Faru tion, filo de bona familio, se vi pensas esti ĝustatempe. Tiam Bodhisatvo-Mahasatvo Akŝajamati deprenis de sia kolo perlan kolornamon, kiu kostas cent-milojn, kaj ĝin donacis al Bodhisatvo-Mahasatvo Avalokiteŝvaro kiel sanktan veston, dirante Ricevu, virtulo, de mi ĉi tiun sanktan veston. Tion li ne ricevis. Tiam Bodhisatvo-Mahasatvo Akŝajamati diris al Bodhisatvo-Mahasatvo Avalokiteŝvaro: Akceptu vi, filo de bona familio, ĉi tiun kolornamon, pro kompatio

³ En la ĉinlingva traduko de Kumaraĝiva estas cititaj 33 formoj de Avalokiteŝvaro: 1. Budho; 2. Pratiekabudho; 3. Ŝravako; 4. Maha Braĥmo; 5. Ŝakro; 6. Iŝvaro; 7. Maheŝvaro; 8. Senapatio; 9. Veŝravano; 10. Malgranda reĝo; 11. riĉegulo; 12. Domestro; 13. Ministro; 14. Braĥmano; 15. Edzino de riĉegulo; 16. Edzino de domestro; 17. Edzino de ministro; 18. Edzino de braĥmano; 19. Bikŝuo; 20. Bikŝuino; 21. Laiko; 22. Laikino; 23. Geknaboj; 24. Dio; 25. Drako; 26. Jakŝo; 27. Gandharvo; 28. Asuro; 29. Garudo; 30. Kimnaro; 31. Serpentego; 32. Homonehomo; 33. Vaĝrapanio

por ni.⁴ Tiam Bodhisatvo-Mahasatvo Avalokiteŝvaro akceptis de Bodhisatvo-Mahasatvo Akŝajamati la perlan kolornamon, pro kompato por Bodhisatvo-Mahasatvo Akŝajamati kaj liaj kvar klasoj, kaj pro kompato por dioj*, drakoj, jakŝoj, gandharvoj, asuroj*, garudoj*, kimnaroj*, serpentegoj kaj homoj-nehomoj. Kaj akceptinte ĝin, li dividis ĝin en du partojn; kaj la unuan parton li donis al Sinjorego Ŝakja-munio, kaj la duan al la Sankta Stopo* de Tathagato-Arhato-Samjaksambudho* Prabutaratno⁵. Kun tia transformiĝo, filo de bona familio, sin prezentas Bodhisatvo-Mahasatvo Avalokiteŝvaro en la mondo Saho.

Tiam la Sinjorego parolis per versaĵo kiel jene:⁶

1. Ĉitradvaĝo demandis al Akŝajamati jenan demandon:
Pro kia kaŭzo, ho Ĝinaputro*, tiel nomata estas Avalokiteŝvaro?
2. Tiam Akŝajamati, posedanto de la vasta vido kaj marprofunda ĵuro,
Parolis al Ĉitradvaĝo: Aŭskultu je la agoj de Avalokiteŝvaro.⁷
3. En la daŭro de supermezure multaj kalpocentoj sub la multaj dekmilionaj
Budhoj,
Ĵuron li faris, kiun, aŭskultu, jen mi klarigos.
4. Kiu, priaŭdinte aŭ vidinte, rememoras min konstante,
Tiu travivos ĉi tie ne vane, sed ĉiujn dolorojn, ekzistojn kaj malĝojojn detruos.
5. Se homo estos enpuŝita en fornegon de malbonulo, kiu celas lin mortigi,
Rememoru li Avalokiteŝvaron; la fajro estingiĝos kvazaŭ akvoverŝita.

⁴ Laŭ ĉinlingva traduko, ni devas intermeti ĉi tie jenon: "Tiam la Sinjorego alparolis al Bodhisatvo-Mahasatvo Avalokiteŝvaro, dirante, 'Akceptu tiun kolornamon pro kompato por Bodhisatvo-Mahasatvo Akŝajamati kaj liaj kvar klasoj, kaj pro kompato por dioj, drakoj, jakŝoj, gandharvoj, asuroj, garudoj, kimnaroj, serpentegoj kaj homoj-nehomoj.'" [kvar klasoj = bikŝuo, bikŝuino, laiko, laikino]

⁵ Budho en antikvega tempo, kiu ĵurpromesis, ke se iam en estonteco iu Budho predikos la Dharmon laŭ la Saddharmapundarika Sutro, li aperigos sian sanktan Stopon, kaj faros ateston. En la XI ĉapitro de la Saddharmapundarika Sutro estas priskribite, ke lia ĵurpromeso estis efektive plenumita, pro prediko de Sinjorego Ŝakjamuni.

⁶ Tradukinto uzis prozformon. La originala verso kaj la ĉinlingva traduko (ankaŭ versaĵo bele verkita) de Kumaraĝiva estas troveblaj en la Aldono 1.

⁷ Ĉi tie la ĉinlingva traduko de Kumaraĝiva iom diferencas, kaj bone akordas kun tio, kio estas dirita en la komenco de proza parto. Jen retradko de ĝi:

1. Sinjorego, posedanto de la belaj signoj!
Denove mi nun demandas,
Pro kia kaŭzo la Ginaputro
estas nomata Avalokiteŝvaro?
2. Sinjorego, kiu posedas la belajn signojn,
verse respondis al Akŝajamati:
Aŭskultu vi pri la agoj de Avalokiteŝvaro,
kiuj bone respondas al ĉiuj direktoj kaj lokoj.

6. Se homo ekfalos en danĝeran maron, kie loĝas drakoj, marmonstroj kaj malbonspiritoj,
Rememoru li Avalokiteŝvaron; li ne subiros sub la reĝon de la akvo⁸.
7. Se homo estas puŝfaligita el la supro de Meru, kun intenco lin mortigi,
Rememoru li Avalokiteŝvaron; aere li staros kvazaŭ la suno.
8. Se ŝtonego kvazaŭ Monto Vaĝramajo estos ekfaligita sur ies kapon, kun intenco lin mortigi,
Rememoru li Avalokiteŝvaron; al li ĝi ne povos difekti eĉ harporon.
9. Se homo estos ĉirkaŭata de armeo da malamikoj, kiuj kun glavo en mano intencas lin mortigi,
Rememoru li Avalokiteŝvaron; baldaŭ ili turniĝos en bonkorulojn.
10. Se homo sub la povo de ekzekutistoj jam staros ĉe la ekzekutejo,
Rememoru li Avalokiteŝvaron; la glavo rompiĝos en pecetojn.
11. Se homo estos ligita per ligna aŭ fera malliberigilo,
Rememoru li Avalokiteŝvaron; ligo baldaŭ malstreĉiĝos.
12. Okaze ke sorĉo, magio, venenherbo, malbonspirito aŭ demono minacas vivon,
Oni rememoru Avalokiteŝvaron; ili reiros tien, de kie ili venis.
13. Se homo estas ĉirkaŭata de jakŝoj, drakoj, asuroj, malbonspiritoj kaj rakŝasoj, forrabantoj de la forto,
Rememoru li Avalokiteŝvaron; al li, ili ne povos difekti eĉ harporon.
14. Se homo estos ĉirkaŭata de timindaj bestoj kun akraj dentoj kaj ungegoj,
Rememoru li Avalokiteŝvaron; baldaŭ ili forkuros en ĉiuj direktoj.
15. Se homo estos ĉirkaŭata de venenaj serpentoj, timegindaj pro flamo kaj fajro,
Rememoru li Avalokiteŝvaron; baldaŭ ili turniĝos senvenenaj.
16. Okaze ke fulmo frapadas el la fulmotondra nuboj,
Oni rememoru Avalokiteŝvaron; estingiĝos ĝi sammomente.
17. Rigardante la vivantojn multe suferantajn kun centoj da maldolĉaĵoj,
Li, pura scipovulo, povas pro vidopovo esti savonto de la mondo inkluzive de dioj.
18. Kompletiginte la mirindan povon, kaj akirinte la vastan scion kaj lertecon,
Li prezentas sin en ĉiuj mondoj en dek direktoj, en ĉiuj regnoj senescepte.
19. Al la estaĵoj malbenitaj en la infero, en la regnoj de besto kaj de Jamo,
Finiĝos la doloro de naskiĝo, de maljuniĝo, kaj de malsaniĝo, unu post la alia.

Tiam Akŝajamati, ĝoja kaj kontentigita, parolis en jena versaĵo:

20. Virtaj okuloj, amoplenaj okuloj, okuloj brilaj per scio kaj saĝo,

⁸ Maro. Sanskrite *jala-rāja*

- Okuloj kompatemaj, okuloj puraj: ho kia admirinde bela vizaĝo, belaj okuloj!
21. Ho, pura persono, kies lumo brilas senmakule, kiel scio forigas malhelon kvazaŭ sunradio!
Kvazaŭ fajrflamo neniel forbatebla, lumo via brile lumas la mondon!
 22. Kompatema persono kun amoplena voĉo! Ho, granda nuboj da virto pura kaj koro amema!
Pluvigante pluvon nektaran de Dharmo, vi ja estingas fajron de la pasio!
 23. En kverelo, disputo, milito, batalado - en granda danĝero,
Oni rememoru Avalokiteŝvaron; li forigos aron da malbonaj malamikoj.
 24. Bruoj de nuboj, sono de tamburo, tondro de pluvonuboj, bela voĉo de Braĥmo, -
Voĉo trairanta la tutan skalon de la sono, estu memorata li, Avalokiteŝvaro!
 25. Memoru, memoru, neniom malfidu la puran personon, Avalokiteŝvaron;
Ĉe morto, en suferado, en malfeliĉo, li estas protektanto, rifuĝejo, ja lasta rifuĝejo.
 26. Li, kiu kompletigis ĉiujn virtojn, kaj vidas ĉiujn estaĵojn kun kompatemaj, amemaj okuloj,
Virtulo, maro da grandaj virtoj, estu laŭdata li Avalokiteŝvaro!
 27. Simpatia por la mondo, li fariĝos Budho en estonteco,
Detruinte ĉiujn dolorojn, timojn kaj malĝojojn; al li, Avalokiteŝvaro mi adorkliniĝu!
 28. Gvidata de Lokeŝvararaĝo, Bikŝuo Dharmakara, honorata de la mondo,
Atingis la puran plej superan vekiĝecon post multaj kalpocentoj de klopodo.
 29. Starante jen dekstre jen maldekstre de la de li ventumata gvidanto Amitabho,
Li honoras Budhojn en ĉiuj regnoj, dank' al meditado vizisimiliga.
 30. En la okcidento troviĝas feliĉa mondo, pura Sukhavatio;
Tie loĝadas nun la gvidanto Amitabho, disciplinisto de la vivantoj.
 31. Tie neniu virino sin trovas; tute nekonata estas malpura dharmo;
Tie idoj de la Budho, ekzistiĝintaj ekapere, sidas sur pura teraso lotusflora.
 32. Kaj la gvidanto Amitabho mem, en la pura, belega teraso lotusflora,
Sidas sur la leontrono, kaj brilas tie kvazaŭ Ŝalaraĝo.
 33. Gvidanto de la mondo, kiun neniu el la tri mondoj egalas!
Lian akumuladon de merito mi laŭdu; ho la plej alta el homoj; al vi, mi tuj similiĝu!

Tiam Bodhisatvo-Mahasatvo Dharanindharo ekstaris el la seĝo, kovris sian unu ŝultron per la survesto, metis la dekstran genuringon al tero, direktis la kunmetitajn manojn al la Sinjorego, kaj diris al la Sonjorego: Sinjorego! Tiuj vivantoj, kiuj aŭdas pri ĉi tiu ĉapitro, la Dharmeco* de la Bodhidatvo-Mahasatvo Avalokiteŝvaro,

priskribo de transformiĝo de Bodhidatvo-Mahasatvo Avalokiteŝvaro nomata Samanta-mukha-parivarto*, mireginda transformiĝo de la Bodhidatvo-Mahasatvo Avalokiteŝvaro, tiuj vivantoj devas posedi ne malsufiĉe da bonradiko.

Dum ĉi tiu Samanta-mukha-parivarto estis eksplikata de la Sinjorego, okdek-kvar mil vivantoj el la aŭskultantaro ricevis en la koron la senkomparan plejsuperan plenvekiĝecon.

ALDONO

Propraj Nomoj Transliteritaj kaj Vortoj Elsanskritigitaj

Akŝajamati [Akṣayamati] 無盡意. Nomo de Bodhisatvo.

Arhato [Arhat] 阿羅漢,應供. Unu el la titoloj donitaj al ĉiuj Budhoj.

Avalokiteŝvaro [Avalokiteśvara] 觀自在,觀世音. Nomo de Bodhisatvo. El la du ĉinlingvaj tradukoj, la unua estas pli bona; tamen, la dua estas pli vaste uzata.

Asuro [Asura] 阿修羅. Demona estaĵo.

Bodhisatvo [Bodhisattva] 菩提薩埵,菩薩. Posedanto de la Bodhio; unu el la tri klasoj de sanktuloj, kiuj celas la Nirvanon. [Bodhisatvo, Ŝravako, Pratiekabudho]

Brahmo [Brahman] 梵天. Dia estaĵo.

Brahmano [Brāhmaṇa] 婆羅門. La klaso de pastroj en la kasta sistemo de la hinda socio.

Budho [buddha] 佛陀. Titolo de adorindeco por la plej altaj sanktuloj.

Ĉakravartiraĝo [Cakravartirāja] 轉輪王. Nomo de mitologia reĝo.

Ĉitradvaĝo [Citradhvaja] 妙幢,妙相

Ĉivaro [Civara] 支伐羅. Vesto de bikŝuoj (monaĥoj aŭ bonzoj).

Dharanindharo [Dharaṇīdhara] 持地. Nomo de Bodhisatvo.

Dharmo [Dharma] 法. Termino ne facile difinebla pro la vastega signifo; koncerne al ĉi tiu Sutro, tamen ĝi povas esti anstataŭata proksimume per "Doktrino."

Dharmakaro [Dharmakāra] 法藏比丘. Antaŭa nomo de Tathagato Amitabho, kiam li ankoraŭ ne ricevis la Budhecon.

Dharmero [Dharmaparyāya] 法門. Parto de la Dharmo aŭ doktrino, predikita de la Budho.

Gandharmo [Gandharva] 乾闥婆, Fabela estaĵo.

Garudo [Garuḍa] 迦樓羅, Fabela estaĵo.

Ĝinaputro [Jinaputra] 佛子, Ido de Budho, t.e. Bodhisatvo.

Infero [Naraka] 奈落,地獄

Iŝvaro [Īśvara] 自在天, Mitologia estaĵo.

Jakŝo [Yakṣa] 藥叉,夜叉. Demona estaĵo.

Jamo [Yama] 夜魔. Demona estaĵo.

Kimnaro [Kiṃnara] 緊那羅, Fabela estaĵo, duone besta kaj duone homa.

Lokeŝvararaĝo [Lokeŝvararāja] 世自在王佛. Nomo de la Budho, kiu instruis la Dharmon al Bikŝuo Dharmakaro.

Mahasatvo [Mahāsattva] 摩訶薩, 大士. Dua titolo por Bodhisatvo.

Maheŝvaro [Maheŝvara / Mahaŝvara] 大自在天. Granda Iŝvaro

Meru [Meru / Sumeru] 須彌, 妙高. Monto en la centro de la kosmo, laŭ hinda kosmologio.

Piŝaĉo [Piśaca] 畢舍遮. Nomo de demono, kiu formanĝas homan energion.

Prabutaratno [Prabhutaratna] 多寶佛. Nomo de Budho.

Pratiekabudho [Pratyekabuddha] 辟支佛, 緣覺, 獨覺. Unu el la tri klasoj de sanktuloj. (v. "Bodhisatvo")

Rakŝaso / Rakŝasino [Rākṣasa / Rākṣasi] 羅刹. Demona estaĵo.

Saho [Saha] 娑婆. La mondo de elportado, t.e. nia homa mondo.

Samanta-mukha-parivarto [Samantamukhaparivarta] 普門品. Ĉapitro pri tiu, kiu turnas la vizaĝon ĉiufanken, t.e. Bodhisatvo-Mahasatvo Avalokiteŝvaro.

Samjaksambudho [Samyaksambuddha] 正徧知. Unu el la titoloj donitaj al ĉiuj Budhoj.

Senapatio [Senāpati] 天大將軍. Estro de dia armeo.

Sentimecodonanto [Abhayaṃdada] 施無畏. Alnomo al Bodhisatvo Avalokiteŝvaro

Sinjorego [Bhagavat] 世尊. Titolo por la Budho.

Stopo [Stūpa] 塔婆. Sankta monumento de la Budhoj.

Sugato [Sugata] 善逝. Unu el la titoloj donitaj al ĉiuj Budhoj. [kiu indas bone]

Ŝakro [Śakra] 帝釋天. Nomo de dio.

Ŝravako [Śravaka] 聲聞. unu el la tri klasoj de sanktuloj. (v. "Bodhisatvo")

Vaĝramajo [Vajramaya] 金剛山. Nomo de monto el la hinda kosmologio

Vaĝrapanio [Vajrapāni] 執金剛. Nomo de mitologia fortegulo.

Veŝravano [Vaiśravaṇa] 毘沙門. Mitologia estaĵo.